

# Speciala Raportisto de Unuiĝintaj Nacioj pri minoritataj aferoj

## Kategorioj de minoritatoj

### *Alvoko pri kontribuoj antaŭ la 31a de majo 2020*

Konforme al sia mandato laŭ la rezolucio 34/6 kaj la decido de la Konsilio pri Homaj Rajtoj 43/115, la Speciala Raportisto pri minoritataj aferoj D-ro Fernand de Varennes, prezentos laŭteman raporton ĉe la 75a sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu donos **detalan analizon kaj emfazos la gravecon kaj amplekson de la kvar kategorioj de minoritatoj (naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj)**. En sia unua raporto al la 72a sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu elmontras lian vizion kaj liajn temajn prioritatojn, la Speciala Raportisto levis la malfacilon rezultantan el persistado de miskomprenoj kaj kontraŭdiraj vidpunktoj pri la uzo de la termino "minoritato" en Unuiĝintaj Nacioj, kaj identigis la bezonon, por progresi efike por atingi la prioritatojn de sia mandato, trakti en studo la amplekson kaj la signifon de la termino "minoritato", kiel ĝi aperas en la Deklaro de Unuiĝintaj Nacioj de 1992 pri la rajtoj de personoj apartenantaj al naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj kaj en la artikolo 27 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj. Tiurilate, lia antaŭa raporto al la 74-a sesio de la Ĝenerala Asembleo prezentis studon pri la koncepto de minoritato kaj proponis formuladon de tio por la celoj de sia mandato, jene «Etna, religia aŭ lingva minoritato estas iu ajn grupo de personoj, kiu konsistigas malpli ol duonon de la loĝantaro de la tuta teritorio de ŝtato kaj kies membroj havas komunajn kulturajn, religiajn aŭ lingvajn karakterizaĵojn, aŭ kombinaĵon de ĉi tiuj trajtoj. Iu persono povas libere aparteni al etna, religia aŭ lingva minoritato, sen ia kondiĉo de civitaneco, restadloko, oficiala agnosko aŭ ia ajn alia statuso.» (vidu la raporton [A/74/160](#)).

Kvankam ĉi tiu estas grava klarigo, ĝi kovras nur unu dimension de la homaj rajtoj de minoritatoj, kiel formulite en la Deklaracio de 1992 de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Minoritatoj Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj, kaj aliaj provizaĵoj de traktatoj de Unuiĝintaj Nacioj kiel ekzemple artikolo 27 de la Internacia Interkonsento pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj artikoloj 17 kaj 30 de la Konvencio pri la Rajtoj de la Infano. La homaj rajtoj de minoritatoj estas do difinitaj por specifaj kategorioj de minoritatoj, kiel tion montras la titolo de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj de 1992 pri la rajtoj de personoj apartenantaj al minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj. La Unesko-Konvencio de 1960 pri la lukto kontraŭ diskriminacio en la kampo de edukado, referencas nur al naciaj minoritatoj. En Eŭropo, kelkaj traktatoj pri homaj rajtoj kaj aliaj temoj rilatas same ĉefe al naciaj malplimultoj.

Sur tiu bazo, kaj por la bezonoj de la raporto de la Speciala Raportisto prezentota al la Ĝenerala Asembleo en oktobro 2020, D-ro de Varennes ekzamenos la gravecon kaj amplekson de la kvar kategorioj de minoritatoj (naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj), kiuj havas diversajn rajtojn en la UN-sistemo.

Ĉi tiu dua kompletiga studo de la Speciala Raportisto ekzamenos la vidpunktojn kaj interpretojn de la diversaj fakoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj de jardekoj publikigas konkludojn, ĝeneralajn komentojn aŭ aliajn instrukciojn pri ĉi tiuj kategorioj de ĝuntoj de rajtoj en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj.

La Speciala Raportisto intencas **ekzameni kaj klarigi la diferencojn kaj la gravecon de la kvar kategorioj de minoritatoj (naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj), kaj la manieron, kiel ties aplikeblo estas komprenata en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj.**

### **Alvoko pri kontribuaĵoj**

Laŭ la kutima praktiko de la ekspertoj, al kiuj diverstemaj mandatoj estas atribuitaj, la Speciala Raportisto bonvenigas kontribuojn de ŝtatoj, agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj, regionaj kaj internaciaj organizaĵoj, naciaj institucioj pri homaj rajtoj, civila socio, sciencistoj, profesoroj kaj esplorinstitutoj, kaj aliaj personoj, kiuj eble dezirus kontribui tiuteme. Ĉi tiuj kontribuoj povas inkluzivi, ekzemple, rekomendojn, pruvojn kaj kazo-studojn.

La Speciala Raportisto deziras kolekti informojn pri la kompreno de Unuiĝintaj Nacioj, de la ŝtatoj kaj de la civila socio koncerne la gravecon kaj amplekson de la kvar kategorioj de minoritatoj (naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj) en la instrumentoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉi tiu alvoko por kontribuaĵoj ne koncernas la diversecon de alioj je nacia aŭ regiona nivelo. Ĝia fokuso estas strikte sur la kvar apartaj kategorioj de koncernatoj, ĝuntoj de la protekto de homaj rajtoj por minoritatoj, agnoskitaj en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj.

### **La sekvaj demandoj celas gvidi la redaktadon de la raportoj:**

1. Bonvolu doni informojn pri la signifo kaj la distingo uzataj por la kvar kategorioj de minoritatoj (naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj) fare de via registaro aŭ organizaĵo. Bonvolu doni ekzemplojn de nacia leĝaro aŭ de naciaj politikoj en ĉi tiu temo, se ekzistas.

2. Bonvolu klarigi vian komprenon pri la amplekso de la rajtoj de homoj apartenantaj al minoritatoj elinter la kvar kategorioj de ĝuntoj de instrumentoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj precipe pri la amplekso kaj naturo de la rajtoj, kiujn ĉiu kategorio povas postuli. Bonvolu ankaŭ informi pri deklaroj faritaj al la diversaj fakoj de Unuiĝintaj Nacioj aŭ ajnajn aliajn informojn pri tio, kiel via registaro aŭ organizo komprenas la alproksimiĝon de Unuiĝintaj Nacioj al la kvar kategorioj de minoritatoj en la kadro de la sistemo de homaj rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj.

3. Ĉu la "novaj" minoritatoj aŭ indiĝenaj popoloj estas konsiderataj kiel apartenantaj al unu el la kvar kategorioj de minoritatoj (naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj) fare de via registaro aŭ de via organizaĵo? Kaj se jes, kiuj?

4. Bonvolu doni ekzemplojn de konsultadoj kun minoritatoj pri ilia aliro kaj vidpunktoj pri ĉi tiuj distingo en via lando, same kiel pri la leĝoj kaj politikoj, kiuj traktas iliajn rajtojn el la vidpunkto de ĉi tiuj distingo.

5. Bonvolu doni ekzemplojn (jurajn kaj nejurajn) pri bonaj praktikoj koncerne la protekton de la rajtoj de personoj apartenantaj al minoritatoj el ĉi tiuj kvar kategorioj de ĝuantoj de la rajtoj. Ĉu ĉi tiuj praktikoj estas malsamaj por ĉiu kategorio?

**Raportoj kaj kontribuoj pri la supraj temoj povas esti senditaj en la angla, franca aŭ hispana lingvo, kaj adresitaj al la Speciala Raportisto per retroŝto sendenda al [minorityissues@ohchr.org](mailto:minorityissues@ohchr.org), antaŭ la 31a de majo 2020.**

**La raportoj kaj kontribuoj estos konsiderataj publikaj dokumentoj, krom se indikite aliel, kaj estos publikigitaj en la retejo de la Speciala Raportisto.**

---

- Traduko el la franca originalo al esperanto: Stefano Keller, ĉefrepresentanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

- Traduction du français en espéranto: Stefano Keller, chef de délégation de l'Association mondiale d'Espéranto (Universala Esperanto-Asocio, UEA) auprès des Nations Unies à Genève.